

Fotis: Vladimir Šimunić

Pli valoras tuj ovo, ol poste bovo.<sup>z</sup>

# KORBO DA OVOJ

EL BRITIO

En multaj landoj oni faras ian ceremonion kun kolorigitaj ovoĵoj, paske; ofte temas pri bela arto, dum en mia lando, Britio, niaj pask-ovoĵoj kutime estas el ĉokolado, amas-produktitaj. Tamen, mi memoras de mia naŭa vivojaro, ke en angla vilaĝo ankoraŭ okazis tiam rito el ia pratempo. Paskan dimanĉon, multaj geknaboj de la vilaĝo iris kun malmole kuiritaj ovoĵoj al unu kampara vojo, kie ni trovis longan deklivon herb-kovritan. Tie ni ruladis niajn ovoĵojn laŭlonge de la deklivo, ĝis ia ŝtono aŭ kolizio rompis ilin. Tiam ni manĝis ilin. Ĉion ni faris kun la plena seriozeco, kiun infanoj portas al misteraj malnovaj kutimoj. Plenkreskuloj diris al mi, ke la praa rito tenis pri la formulado de la ŝtonego de la tombo de Kristo.

En amatoraj sport-programoj, precipe en lernejoj, foje okazas „vetkurado ova-kaj-kulera“; la vetkurantoj penas kuri kiel eble plej rapide, sed dum ĉiu portas sur kulero ovon, kies faŭlo signifas malvenkon. Se vi kredas, ke tio estas facila, provu fari ĝin.

Malpli ĉarma kutimo estas, ke foje ni ĵetas ovoĵojn kontraŭ politikiston, kiun ni malsatas. Plurfoje oni ĵetis ovoĵojn kontraŭ la nunan britan ĉefministron. Malbela gesto; oni devus ĵeti valorajn argumentojn.

Ekzistas pluraj anglaj esprimoj, proverboj kaj similaj, pri ovoĵoj. „Anasa ovo“ estas nul poentoj, en la ludo kriketo. „Ovobatilo“ estas slanga esprimo por helikoptero. „Malbona ovo“ (tio estas, ovo putra) povas esti aŭ malbona persono, aŭ malagraba evento. „Doni al iu ovon de koko“ signifas, sendi tiun personon fari ion neeban, kiel ŝercon. Sed iu, kiu arogante komencas informi aŭ konsili iun, kiu estas pli aĝa aŭ pli sperta, eble aŭdos, „Instruu vian avinon kiel suĉi ovoĵojn!“ „Ovokapulo“ en Britio kaj Usono, estas iom malestima vorto por intelektulo. Iam ni diris, sed ne plu, al iu, kiu venas, kvazaŭ kun io grava, kun novaĵoj neinteresaj aŭ ia stultaĵo, interrompante ion pli valoran, „Vi venas kun kvin ovoĵoj kontraŭ penco, kaj kvar el ili estas putraj.“ Sed ni ankoraŭ diras, foje, „certe kiel ovoĵoj estas ovoĵoj“. Kial ovoĵoj estas pli certe ovoĵoj, ol ekzemple tasoj estas tasoj aŭ karotoj estas karotoj, oni ne scias, sed kelkaj sugestis, ke eble rilatas al matematiko aŭ logiko, „certe kiel iks estas iks“, kiu en la angla sonus tre simile (proks. eks iz eks kaj egz iz egz).

En pli frua epoko, ekzemple ĉe Ŝekspiro, oni foje diris „ĉu vi prenas ovoĵojn kontraŭ via mono?“ aŭ „Li volonte prenas ovoĵojn kontraŭ mono.“ Tio signifas malbonan aĉeton, kiam oni donas ion valoran kaj ricevas ion multe malpli valoran. Sed se ni „piediras sur ovoĵoj“, ni pensas aĝi aŭ paroli takte, en la delikata situacio. Se oni malsukcesigas ion, ekzemple komploton de teroristoj, preskaŭ antaŭ la komenco, oni „disprenas ĝin en la ovo.“

Du esprimoj de pli fruaj epokoj nun estas malaperintaj, ĉar kuiraj procedoj malaperis; pri rostado de ovoĵoj, kaj surstanga rostado de ovoĵoj. Kiam la plimulto da hejmoj uzis lignon por hejti, oni ofte rostis ovoĵojn; tiu tasko postulis iom da atento kaj lerteco, kaj tio donis la proverbon, „Estas racio en la rostado de ovoĵoj“. La ideo estis, ke pri eĉ la plej malgrava afero, ekzistas plej bona metodo, plej saĝa sinteno: racio ĉiam valoras. Kvankam ni ne diras tion, nuntempe oni same povus diri, „Estas racio en fritado de ovoĵoj“, alia tasko, kiun oni povas fari tre bone aŭ tre aĉe. Iam, anglaj kuiristoj uzis teknikon, kiu certe estis malfacila, por rosti ovoĵojn sur stango: oni unue boligis ilin, poste elprenis la flavaĵon, miksis ĝin kun spicoj, remetis ĝin en la ovon, trapikis kaj rostis la ovon. Tiun iom strangan taskon oni devis fari tre rapide, kaj atenti seninterrompe; do la proverbo „Mi havas ovoĵojn sur la rostostango“ iam signifis, „Mi estas tiel okupita, ke mi ne povas atenti ion alian.“

Pri iu, kiu tro optimisme atendas grandegajn rezultojn el malgranda komenco, oni iam diris, „Montru al li ovon, kaj tuj la aero estas plena de plumoj“ – tio estas, de la kokoj, kiujn li prirevas. Esprimo, kiun ni ankoraŭ uzas, eĉ ofte, estas „Ne metu ĉiujn viajn ovoĵojn en unu korbon“; – ne risku ĉion per unu plano.

Se iu diras, „Bona parte, kiel la ovo de la vik Irio (sub-pastro)“ tiu aludas tre konatan karikaturon, kiu iam aperis en la fama brita humurgazeto, „Punch“ (Pulĉinelo): timema juna vikario manĝas la matenmanĝon kiel gasto de sia episkopo, kiu demandas lin, ĉu la ovo plaĉas al li. La ovo estas malfrasa, sed li ne kuraĝas diri tion, do, penante esti takta kaj samtempe diri la veron, kompromisas: „Ĝi estas bona ... parte.“ Mi eĉ vidas iam en serioza recenzo: „libro kiel la ovo de la vikario“.

Kaj se oni devas fari ion pro bonaj motivoj, sed la faro kaŭzos suferon al iu, aŭ ian alian malbonon, oni foje konsolas sin mem, kvankam ne estos tre konsole al la viktimo, „Vi ne povas fari omletojn sen frakasado de ovoĵoj.“

## ASTRONOMIO

– Kiu estas pli grava, luno aŭ suno? – demandas unu knabo la alian.

– Memkompreneble tio estas luno ĉar ĝi lumas dum nokto kiam ne estas hele kiel dum tago.

## KONATULO

– Kiu estas konatulo?

– Persono kiun ni sufiĉe bone konas por pruntepreni monon de li, kaj kiun ni tamen nesufiĉe konas por ke ni povu pruntedoni monon al li.

## POR FUMANTOJ

Mi dezirus ĉesi fumi, sed mi ne scias kiamaniere – diras unu homo al sia amiko.

– Mi helpos al vi – respondas la amiko. – Vi devas nur aĉeti guman matracon kaj plenigi ĝin per benzino. Tiam eksidu sur la matracon.

## FIŜKAPTISTA

– Kiam fiŝkaptisto diras la veron?

– Nur kiam li diras ke lia kolego fiŝkaptisto mensogas rilate al la grandeco de la kaptita fiŝo.

## OPTIMISTO KAJ PESIMISTO

– Kiu estas la diferenco inter optimisto kaj pesimisto?

– Pesimisto diras ke ĉio estas tiel malbona ke pli malbona ĝi ne povas esti, kaj optimisto diras ke tamen povas esti pli malbone ol nun estas.

## EL INFANA BUŜO

Juna patro staras ĉe fenestro, tenante en la brakoj sian etan filon.

– Vidu, karuleto, vidu la azenon! Ĉu vi vidas ĝin?

– Jes, patjo, la malglanda azeno, bela azeno malglanda.

– Ne malgranda ĝi estas! Ĝi estas granda! Vidu kiel granda ĝi estas!

– Sed vi estas pli glanda, patjo! Ĉu ne, patjo? Multe pli glanda vi estas ...

## DU EBRIAJ OVOJ


Du ebriaj ovoĵoj skuiĝas sur la relvojo.

Diris la unua: „Ĉi tiu ŝtuparo tamen ege altas.“

Respondas la alia: „Pli malbonas ke la balustrado estas tro malalta.“

Alfonso PIJNACKER  
Moordrech, Nederlando

# OVO-ANTENO




\*\*\*

– Patro, kiam mi grandiĝos, mi estos polusa esploristo.  
 – Kara filo, tio estas bonega profesio.  
 – Nu patro, mi deziras prepariĝi jam hodiaŭ al tiu laboro.  
 – Sed kiel, fileto?  
 – Vi donu al mi ĉiutage monon por aĉeti glaciaĵon. Tiamaniere mi plej bone alkutimiĝos je la malvarmo.

\*\*\*

Instruisto diras al Jozefo:  
 – Jozefo, montru al ni sur la mapo Amerikon!  
 Jozefo montras sur la mapo Amerikon. La instruisto konstatas tiam, ke Jozefo sukcese respondis kaj direktas sin al ĉiuj lernantoj kaj demandas:  
 – Sed kiu malkovris Amerikon?  
 Ili respondis unuvoĉe:  
 – Jozefo.



Fotis: Vladimir Šimunić

## DIVERSAĴOJ

En iu muzeo multaj homoj trarigardas mumiojn. Antaŭ unu el ili estas skribite: „2149 jaroj a.K.”  
 – Patro, kion signifas tio „2149 jaroj a. K.”? – ekdemandis knabino sian patron.  
 – Tio estas la numero de la aŭtomobilo, kiu surveturis la faraonon.

\*\*\*

En la antaŭurbo de iu urbego kunpuŝiĝis du aŭtomobiloj. Neniu veturisto estis vundita sed ambaŭ aŭtomobiloj estas neveturivaj. La veturistoj piedŝtaras kaj lamentas. Unu inter ili elpoŝigas botelon da konjako kaj diras:  
 – Ni trinku iomete, por ke ni senekscitiĝu!  
 – Bonega ideo – respondis la alia akceptante la ekdonitan botelon kaj eltrinkis kelkajn glutojn. Tiam li redonis la botelon al ties posedanto. Tiu ŝtopis ĝin kaj enpoŝigis.  
 – Nu, ĉu vi ne trinkos? – demandas la trinkinto.  
 – Kontraŭe, kial ne, sed post kiam la policista kuracisto prenos mian sangon por kontroli la alkoholkvanton en ĝi.

\*\*\*

La direktoro de iu granda uzino deziranta postenigi novan oficiston, telefonas al iu sia kolego:  
 – Ĉe ni konkuris via eksa librotenisto. Kiel longe li laboris ĉe vi?  
 – Kelkajn horojn.  
 – Sed li konvinkis nin, ke li estis en via entrepreno tri jarojn.  
 – Vi demandis kiel longe li laboris kaj ne kiel longe li estis en nia entrepreno.

## VORTOJ EN LA VORTO

### VETERANO

En la supra vorto kaŝas sin laŭ la sama literinspekvo almenaŭ 18 aliaj konataj o-vortoj. Provu malkaŝi ilin ankaŭ vi. Eble vi sukcesos trovi eĉ iun plian vorton.

(SOLVO: vetero, veto, vero, veo, eterno, etano, eteno, etero, etno, etro, tero, Tero, terano, teo, erao, eno, rano, ano ...)

Janez Jug



Mikael KOROTKOV

# Ĉasisto je mamutoj

Dum miaj laboroj ĉe la urbeto Kolberi apud skeleto de mamuto estis trovita aĵo de nekomprenebla destino el metalo kaj plasto. Tiu sensacio disfamiĝis tra ĉiuj gazetoj de la mondo, kaj kelkaj sciencistoj en diversaj landoj sendepende unu de la alia eldiris la hipotezon pri aliplaneda origino de la aĵo. Poste tiu hipotezo estis refutita.

El gazetoj

LA 10-a DE APRILO. Mi estas freneze, freneze, freneze feliĉa! Realigis mia revuo! Edna iĝis mia edzino! La kvaran tagon jam mi ne sidigas ĉe la pentrostablon. Por ke tiuj tagoj de tiu sovaĝa ĝojo restu por ĉiam kun mi, mi decidis skribadi taglibron. Edna estas miraklo de la naturo, la perfekteco mem, mi deklaras tion kompetente, kiel pentristo. Sed eĉ ne tio estas ĉefa, ni kun Edna havas eksterordinaran parencecon de la animoj. Ni malkovris tion, kiam ni nur konatiĝis. Kiam mi nur komencis iun el miaj amataj versoj de Walton aŭ Shakespeare, Heine aŭ Armstrong, Edna tuj daŭrigis ĝin.

Mi ne trovas, ne trovas vortojn! Jes, por hodiaŭ mi estas devigita fini. Edna preparis la manĝotablon kaj vokas min al si. Ni drinkos nian ŝatatan vinon, legos versojn, parolos pri pentroarto ... Mi iras, iras.

LA 13-a DE APRILO. Hodiaŭ lastfine mi sidigas ĉe la stablon, decidis la tutan tagon dediĉi al laboro. Edna foriris en la urbon aĉetadi kaj viziti siajn gemaljunulojn. Mi, memkompreneble, estis kontraŭ. Ne plaĉas ili al mi, precipe la bopatro. Ne, sendube, mia malamikeco al tiu maljuna stultulo eĉ iom ne koncernas Edna-n. Edna estas surtera anĝelo.

Sed la maljuna babilulo, kvankam portas la stelon de l' aparteno al la Ligo de la Bonhonesto Moralo kaj ĉiel tiun apartenon reklamas, laŭ mia opinio tamen komercaĉas en la nigra merkato. Kia indigniga hipokrito! Kia abomena malhonoro al la Kodo de la Ligo! Sed ke li estas ligita kun la nigra merkato, mi estas preskaŭ certa. Se ne, de kie li havas tian frenezan monon? Jes, li kontrolas ĉiujn modajn atelierojn kaj restoraciojn de l' urbo, sed la ŝtato limigas ja la profitojn de privataj entreprenistoj. Kaj laŭ la Kodo de la Ligo konvenas ĉiujn superrestojn kontraŭ raciaj bezonoj fordoni en publikajn fondusojn. Tiaj homoj, kiel mia bopatro, aparte-

nas al la Ligo nur laŭvorte, sed fakte ĉiam estas pretaj meti unu aŭ du milojn en sian poŝon.

Estas interese, ĉu konjektas pri tio Edna? Mi opinias, ke ne, por ŝi tio estus terura bato. Ŝi estas ja edukita laŭ la plej bonaj ekzemploj de la literaturo kaj de l' arto de Humana Klerigado.

Sed al diablo iru mia bopatro! Tamen Edna estas absoluta kontrasto al li, kaj nia socio progresas plu. Kiam vi iras laŭ la strato, ĉiu dua pasanto havas la stelon sur la brusto. Kaj de tago al tago ilia nombro pligrandigas.

Nu, sufiĉas, mi iras labori, krei!

LA 14-a DE APRILO. Hieraŭ vespere ni kun Edna estis sur la limo de granda kverelo. Pro ŝia paĉjo, kompreneble. Antaŭ nelonge li aĉetis tempomaŝinon. (Tiu aĵo kostas, certe, frenezan monon. Do mia supozo pri la nigra merkato ne estas senmotiva.) La lastan semajnfinojn la gemaljunuloj pasigis en la 19-a jarcento. Nur tio jam indignigis min. Ĉu tiaj homoj estas indaj je vojaĝado en la tempo? Ili tie ne kulturon ja kaj ne kutimojn de la epoko studis. Plej verŝajne li aĉetis iajn bagatelajojn, kaj nun vendos ilin al fiamatoroj de antikvaĵoj.

Al Edna ili promesis, ke en la sekvonta fojo ankaŭ nin prenos. Iru ili al diablo! Mi opinias, ke tio estas senmorala — tiel kaŝe ŝtelobservi la homojn de pasintaj epokoj. Kaj krome, mia amiko Rajmondo, adepto de la skolo de la filozofia-matematika pentroarto, diris, ke tia vojaĝado povus rezultigi neinvertigeblajn deformadojn de l' historio. Ĉu prava estas Rajmondo aŭ neprava, mi ne scias, sed mi estas certa, ke kiam tempomaŝinoj iĝos vaste uzataj, oni nepre enlistigos respondan punkton en la Kodon.

Edna kun mi longe ne konsentis, ni preskaŭ kverelis, sed finfine mi ŝin konvinkis. Mi konsilis pli malofte renkontiĝi kun la patro.

LA 20-a DE APRILO. Tre malagrabla tago. Nin kun Edna en nia modesta loĝejo degnis viziti ŝia paĉjo. Ni tiutempe parolis pri filozofiaj aspektoj de la poezio de Walton, sed li venis kaj komencis pri siaj restoracioj kaj atelieroj. Idioto!

Antaŭ ĉio li klerigis nin pri la lastaj modoj en la sfero de vestaĉoj kaj manĝaĉaro. Emfazis fabrikaĵojn el feloj de mamutoj: peltoj ĉiaspecaj, mansaketoj, pelerinoj. Kaj en restoracioj iĝis laŭmodaj manĝaĵoj el mamutaĵo kaj cetero, kaj cetero. Tiu maljuna stultulo havos ankoraŭ sufiĉe de energio por disbati ĉiujn mamutojn en la mondo. Malfeliĉaj animaloj. Ilin, verŝajne, atendas la sorto de la sabrodentaj tigroj. Aperis la modo, poste oni enlistigos ilin en la Ruĝan Libron, sur kiun brakonieroj malkaŝe kraĉas, kaj ĉiuj ĉi peltoj kaj mansaketoj moviĝas tra la nigra merkato per ankoraŭ pli forta torento.

La entrepreno de mia bopatro dank' al tiu modo ege prosperas, sed malhelpas unu bagatelo: sur la Tero ne restis tro multe da mamutoj. Nur la licenco por pafmortigo de mamuto kostas tri mil stelojn. Poste oni devas veturi en la Nordajn forstojn, elspezi kelkajn tagojn por elserĉi beston. Kaj kiam ĝi estas batita, oni devas lui fridigilon. Tro grandaj estas la malprofitoj.

Sed ĉu povas ne trovi elembarsigon tia aferisto, kia mia bopatro? Mamutojn oni povas akiri kun la helpo de la tempomaŝino el la antaŭglacia epoko. Kaj sen etaj duboj li proponis okupiĝi pri tio al mi. Nature, pro solida pago. Mi ne komprenas, kiel oni povas ĝis tia grado arogantiĝi! Kaj tian malpuran negocon proponas ano de la Ligo! Kaj al kiu? Al la homo, dediĉinta sian vivon al la servo de l' alta arto. Memkompreneble, mi ĝentile rifuzis, kaj en la animo insultis lin per malafablaj vortoj.

Adiaŭis la bopatro sufiĉe senemocie. Forirante li apenaŭ rimarkeble, sed multsignife ridetis.

Kiam li foriris, mi en kategoria formo deklaris al Edna, ke la vizitoj de ŝia paĉjo malhelpas al mi enpenŝiĝi en la kreadon. En tiu tago ni kun ŝi unuafoje kverelis.

LA 10-a DE MAJO. Mizeraj filistroj. Hodiaŭ mi volis vendi iun pentraĵon, sed — ve! Preteriros, verŝajne, ne malpli ol cent jaroj, antaŭ ol meza filistro supreniros ĝis la alteco de vera arto.

En la hejmo jam delonge forestas vino, ni kun Edna ekzistas per pli ol modesta tagmanĝo. Mi ne havas eĉ malgrandan monon por aĉeti farbojn kaj tolon. Ŝajnas, ke neniam ankoraŭ mi ektrovis min en tia stulta situacio.

Mi tre bedaŭras Edna-n. Ŝiaj trajtoj de vizaĝo akriĝis kaj sub la okuloj estas rondoj. Ne restas io alia, ol forveturi ĉasi je mamutoj.

LA 12-a DE MAJO. Mi revenis de la ĉasado, ricevis de l' bopatro kontentigan sumon. Mi povus pakekviete okupiĝi pri la pentroarto, sed min turmentas ia neklarigebla konfuza maltrankvilo. Dum mia foresto io aliĝis. Timige estis vidi homojn, iaj indiferentaj rigardoj, apatiaj vizaĝoj. Sed la plej terura aĵo — io okazis al Edna. Ekstere ŝi estas kvazaŭ la sama, kiel antaŭe — miraklo de la naturo, sed jen ... Tute alia konduto al mi, sinteno, lingvo, gestoj. Ŝi asertas, ke antaŭhieraŭ antaŭ la ĉaso mi certigis ŝian paĉjon, ke mi veturado ĉasi tri fojojn semajne. De kie tiuj novaĵoj? „Sed kiam mi pentros?“ — demandis mi. „Desegnaĉos vi dum la intertempoj,“ — respondis Edna kaj iel vulgare ekridis. Ŝi diris „desegnaĉos“! Ĉio ĉi estas influo de ŝia abomena paĉjo!

Edna ne intencas aliĝi sian opinion. Por ke ne aperu kverelo, mi kon-

sentis veturi al ĉaso ankoraŭ unufoje.

LA 14-a DE MAJO. La ĉaso estis malsukcesa. Kiam mi senfeligis la mamuton, pro laodoro de la sango kunkuris tuta aro da sabrodentaj tigroj. Mi sukcesis transporti en la maŝinon ne pli ol cent kilogramojn da vivando kaj pecon da felo. Mi mem apenaŭ restis viva.

Kiam mi revenis, mi elspezis ne malmulte da streĉoj antaŭ ol trovis mian domon. Apenaŭ rekonas bone konatajn lokojn. Jen nia kun Edna domo, kaj la mebloj en ĝi estas preskaŭ la samaj. Preskaŭ. Nur sub supra rigardo. Sed se rigardi atente — ĉio estas fremda. Jen, ekzemple, kostumo. Kvazaŭ la sama, bruna, sed ĝi estas ia sengusta, mi tian neniam aĉetus. Jen la pasporto en poŝo. Nu certe, tio estas mi, G. D. Montag. Naskiĝjaro ... Naskiĝloko ... Familia situacio ... FRAŬLO!

Kion do ĉio ĉi signifas?

Kie estas Edna?

Ŝajnas, ke mi febras, plej verŝajne, ke mi kaptis en tiu tempo iun infekton. Ankoraŭ pli malbone, mian gamo-desinfektilon mi perdis, verŝajne tie, kiam forkuris de tigroj.

Mi volis iri al apoteko aĉeti novan ilon, sed monon, kiun mi ricevis por la unua mamuto, ne trovis. Kunpreminte la dentojn, mi iras al la bopatro.

Lian domon mi ne povis trovi. Sur la loko, kie ĝi staris, nun estas ia sensuka skvareto.

Mi trovis la bopatron en unu malriĉa restoracioto, sed ... ŝajnas, ke li estas tute ne mastro, sed simple maljuna babilema vinoĉerpisto. Min li ne rekonis, kvankam niaj rigardoj kelkfoje

renkontiĝis.

Mi diris al li, ke kunveturigis mamutajn kaj pecon da felo.

— Mamutajn? — redemandis li. — Junulo, mamutoj formortis longe antaŭ la naskiĝo de Kristo. Ĉu vi de la Luno ekfalas?

(Denove io nekutima, en MIA tempo oni diris: „de la Marso“.)

— Ho jes, mamutoj! — Li petoleme palpebrumis al mi. — Nu-nu! Se mi ne eraras, vi estas klaŭno, ĉu ne? Ŝajnas, antaŭnelonge mi vidis vin ĉe la televido ...

(Diablo prenu, ILI havas televidon! Ĉe NI televidon jam neniu rigardas, estas ja holovido.)

— Kie estas Edna? — demandis mi.

— Kiu?

— Via filino kaj mia edzino!

— Mia filino? — La maljuna stultulo ekjelpis de plezuro. — Tiu cirkisto asertas, ke mi havas filinon! Hi-hi-hi! Jes-jes, mi ne eraris, vi estas tiu sama klaŭno. — Li palpebrumis al iu malantaŭ mia dorso kaj turnis fingron ĉe la tempio.

— Tio min ĝisfine kolerigis.

— Finu petoli, — mi diris, — paĉjo! Vi ja min sendis por mamuto.

— Permesu, permesu! Mi vin ankoraŭ nenien sendis. Vi mem tion elpetas!

Kun tio mi foriris. Ĉu efektive mi eraris, kaj tia homo ne estas al mi bopatro? La samaj bukletoj ĉirkaŭ la kalvaĵo, la sama fia multsignifa ride-to ...

LA 15-a DE MAJO. Mi tute ne komprenas, kien mi trafis, kaj kiel mi vivos plu.

Mi traserĉis la tutan hejmon, sed mi ne trovis la plej bonajn miajn pentraĵojn. Sed kio estas pli malbona — mi tre malklare memoras, pri kio estas tiuj pentraĵoj.

Mi eksciis, ke en TIU ĈI mondo estas sufiĉe multe da homoj, ne havantaj monrimedojn por ekzistado. Por tagmanĝo ili ricevas senpage teleron da supo, por kiu oni devas atendstari longan vicon. Kia humiligo! Mi ne scias, ĉu mi povos alkiutiĝi al tio.

Sur neniu mi vidas la signojn de l' aparteno al la Ligo. Eble en TIU ĈI mondo ĝi entute ne ekzistas? Se en TIU, NIA mondo vespere estis dangene eliri surstraten, tiukaze kio fariĝas en TIU ĈI?

Oni rigardas min kiel skizofreniulon, kiam mi parolas pri telebiblioteko, holovido, iatronoj, PT-komunikigo kaj aliaj ĉiutagaj aĵoj. Neniu aŭdis pri bone konataj ĉe ni poetoj, verkistoj, pentristoj. Ŝajnas, ke ĉi tie neniam ekzistis K. Walton. Sed ni kun Edna tiel amis lin. Kaj Edna-n mi ne trovis, mi timas, ke ŝi en TIU ĈI mondo ankaŭ ne ekzistas. Kaj tial kiun signifon havas ĉio alia? ...



# BALADO PRI VERDA ĈAPO

Vittorio Dalacqua

DESIGNIS : MIRKA TOMEČKOVÁ



Ĝstis foje Ĉapo Verda,  
bona knabo,  
multe lerta,  
diligenta  
novlernanto  
de la lingvo

ESPERANTO!



Dum li iras al la grupo,  
renkontiĝas kun la lupo,  
deĵoranto sub servuto  
de la Brita Instituto  
por la svingo kaj la leg'  
de la flago Union Jack.  
Kun oksforda tono diras la lupeg:

"Vi kien iras?"

"Al la kurs'kon-  
versacia de la lingv'  
internacia, kaj  
neutrala kaj fa-  
cila, por la tu-  
ta mond'utila -"



Tuj respondas Ĉapuleto  
kaj en man'verda libreto,  
tre ĝentile salutante,  
al la klub'ekiras lante.

Sed la lupo  
pli rapide  
ĝin atingas  
kaj perfide ...



... ruze trompas instruiston,  
kiu perdas la ekziston,  
formanĝinta unuĝlute ...





...de la lupo, kiu tute  
tuj kamuflas sin simile  
kaj atendas tre trankvile.  
TOK, TOK!




Venas Ĉapo frape kaj li staras  
mire, gape.  
"Kiel grandaj la okuloj!"  
"Por kontrolo de l'reguloj,"  
diras lupo sen ŝanceloj.



Kiel grandaj  
la oreloj!  
Verda Ĉapo  
insisti provas.  
Tiel aŭdi bone povas  
mi pri kaz'akuzativa!  
Verda Ĉapo plu naiva:



"Kial estas buŝ' enorma  
kiel granda pordo forna?"  
"Por vin mangi ja pli bone!"  
Kaj la lupo senpardone  
salte kaptas Ĉapuleton,  
mangas kolon,  
mangas kapon...  
Li englutas dumminute,  
lin kruele voras tute,  
ŝiras, maĉas lin kun krako  
gis pleniĝo de l'stomako...



Kaj post tiu entrepreno  
La lupeg'sen ia geno  
vivis longe, dumjarcēnte  
tre feliĉe kaj kontente.

  
**FINO**

# ILI KAPTIS ELZAN!

„Bela”, pensis Cipriano rigardante la junulinon, kiu staris trans la skribotablo, „sed laŭ tute alia maniero ol mia Elza.”

Li pravis. Elza havis iom angulecan vizaĝon, tre nigrajn harojn, kaj haŭton bruniĝeman, dum ĉi tiu estis blonda kun ronda, roza vizaĝo. Elza havis longajn kruojn, kaj longan nazon. Ĉi tiu estis ne pli ol mezalta, kaj ŝia nazeto direktiĝis ĉielen.

Cipriano hezitis. Ĉu estas saĝe peti tiun junan personon preni sur sin la delikatan taskon, por kiu li venis?

„Kiel mi povas servi vin?” ŝi diris per muzika voĉo.

Lia dubemo tiel klare legiĝis sur lia vizaĝo, ke ŝi ekridis.

„Vi ne fidas min, ĉu? Vi trovas min tro juna por direkti edziĝ-agentojn, tute certe. Permesu, ke mi prezentu min. Mi nomiĝas Diana Belpar. Foje amiko diris al mi: ‘Via familia nomo sonas kiel nomo de edziĝ-agento’. Mi pensis: ĉu tio ne estus signo de l' destino? Mi provu. Nu, mi provis kaj sukcesis. Belpar estas nun la edziĝ-agento plej bonfama en la urbo, ĉu ne? Eble ĝuste ĉar mi estas juna, mi aliris la demandon laŭ nova vojo, kun modernaj principoj. Nu, diru al mi, sinjoro, kiel vi nomiĝas, kaj kia estus por vi la ideala vivkunulino.”

„Ne mi deziras edziĝi, s-ino Belpar. Mi persone jam havas edzinon, ne idealan, sed tute bonan por viro, kiu ne povus esti ideala edzo. Ne. Mi ne venas por mi. Kaj ĝuste tial mia tasko estas tre delikata.”

„Pri kio do temas?”

„La afero devas resti absolute sekreta. Se iu ajn eksciis ... Estus katastrofo.”

„Kompreneble, kompreneble. Sed vi povas fidi min. Mia agentejo estas bonfama ankaŭ pro tio, ke nenio ĉi tie dirita diskoniĝas ekstere.”

„Nu, mi ne scias, sed tamen, mi prenos sur min la riskon. Mia mastriĉo, kiu deziras edziniĝi, estas la grafino de-Montokalva.”

Se Diana Belpar sentis miron, ŝi ĝin bonege kaŝis. Moviĝis eĉ ne muskoleto de ŝia vizaĝo. Kun la sinteno de bona oficistino, ŝi simple notis la nomon.

„Ŝia grafina moŝto estas tre ege riĉa”, malhonestis Cipriano, „kaj ŝi nature timas, ke neseriozuloj provos edziĝi kapti ŝian monon. Tial speciale gravas sekreteco. Kaj tial ŝi konsideros nur proponojn de viroj vere riĉaj, ĉar nur tio garantios, ke ne la mono ilin altiras al ŝi.”

„Evidente. Kiom aĝa estas la grafino?”

„Kvardek-naŭ-jara. Ŝi havas la kastelon, kiun vi certe konas, en belega loko, kaj unu el ŝiaj kondiĉoj estas, ke la edzo konsentu vivi tie kun ŝi.”

„Ĉu ŝi jam edziniĝis antaŭe?”

„Jes, dufoje. La unua edzo forlasis ŝin, la dua mortis.”

Desegnita Teodora Kucinac



„Kian specon de viro ŝi preferus renkonti?”

„Kiel mi diris, la unua kondiĉo estas, ke li estu riĉa. Sed ŝi deziras krome viron laboreman, kuraĝan, pli malpli samaĝan, viron, kiu sukcesis en sia profesio kaj tiel fakte elmontris sian valoron. Industriiston, ekzemple...”

„Jes, mi vidas.”

„Sed estas aspekto tre delikata en ŝia decido, kaj sekve en mia tasko. Mi ne dubas, ke vi komprenos ŝian deziron: la alia persono devas ne scii, ke ŝi turnis sin al edziĝ-agento. Se diri veron, ŝi tute ne ŝatas la ideon uzi viajn servojn. Ŝi tion akceptis nur, ĉar ŝi ne kredas je la ebleco solvi sian problemon alimaniere, sed la ideo tre malplaĉas al ŝi. Ŝi hontas.”

„Nu, jes, mi povas tion kompreni, sed ... Kion mi povas fari? Mia rolo estas konigi unu al la alia personojn, kiuj aperas kapablaj ekami sin reciproke. Se mi ne povas sciigi al ŝi la nomon de eblaj vivkunuloj, kion mi povos fari?”

„Ĉu vi ne povus komuniki ilian nomon al mi? Ŝia grafina moŝto petis min pli diskrete. Mi konas ŝin tre bone, kaj ŝi havas plenan fidon al mi. Mi povus viziti la koncernajn personojn, vidi mem, ĉu ili taŭgos ... Ne estas ia ajn risko por vi: geedziĝo ne okazas, se unu el la koncernatoj ne diras „jes”, kaj je sia aĝo, ŝia grafina moŝto scias, kion ŝi faras.”

Diana rigardis Ciprianon tre longe.

„Bone,” ŝi fine diris. „Se iu prezentiĝos, kiu respondas al la deziroj de via grafino, mi ekrilatos kun vi.”


La ĉielo bluis, la birdoj kantis, la aero varmetis agrable: ŝajnis, ke la tuta naturo decidis montri sin plej gaja por bonvenigi Johanon, la sekretarion de s-ro Pipelbom, kiam, la sekvantan matenon, li eliris el la hospitalo. Ankoraŭ iom pala, li ĝojis senti sin denove sana.

Li konis sian mastron, li sciis, ke kiam tiu ion decidis, li ne ŝanĝas sian ideon, sed efektivas ĉion necesan por trafi la celon, kiun li difinis al si.

Tamen, ĉi-foje, Johano duone atendis, ke s-ro Pipelbom ne restos firma ĉe sia decido serĉi edzinon pere de agentejo. Verdire, li ne estis tute certa, ke la vizito de lia mastro okazis reale. Ĉu ne lia malsaneca stato lin igis imagi ĝin? Mire do li aŭdis la riĉulon tuj informiĝi, ĉu li jam faris la necesajn aranĝojn.

(daŭrigo en la sekva numero)





Iufoje renkontiĝis Mark Twain kaj la franca verkisto Paul Bourget.

— Kiam Usonano havas nenian alian okupitecon — diris Bourget — li kutime studas genealogion, komencante de sia avo.

— Tio estas vero — jesis Twain — sed kiam Franco nenion laboras li kutime divenadas, kiu estas lia patro.

\*\*\*

Doganisto severe demandis la verkiston Oscar Wilde, kiu alvenis en Usonon:

— Ĉu vi posedas ion por fiksado de la dogano?

— Nenion krom mia genio — respondis rapide kaj prete la verkisto.

\*\*\*

Edzino (dezirante ege viziti la marbordon kaj prepariĝanta forvojaĝi):

— Sciuj bone, se mi forvojaĝos ĉemaren, mi songos nur pri vi.

La edzo respondas tute trankvile:

— Tamen estas pli bone, ke vi restu hejme kaj ke vi ĉi tie songu seninterrompe pri la maro.

\*\*\*

Interparolas du bonaj kolegoj:

— Mi edziĝos nur kun tiu, kiu estas samtempe riĉa kaj stulta.

— Kial nur kun tia edzino?

— Se ŝi ne estas riĉa, ne konvenas por mi kaj, se ŝi ne estas stulta, ŝi ne volos min.

\*\*\*

— Mi ne miras, kiel Casanova sukcesis devojigi multajn virinojn.

— ?!

— Mi nur miras, kiel li sukcesis liberigi sin de ĉiuj.

\*\*\*

Arthur Conan Doyle, verkisto de klasikaj detektivaj romanoj kaj „patro” de Sherlock Holmes, esplorante la psikologion de krimuloj, determiniĝis por nekutima eksperimento: li sendis al 12 siaj geamikoj, ĝentilhomoj senmalvirtaj, telegramon ĉi-enhavan:

— Tuj fuĝu, ĉio estas malkovrita!

Dum 24 horoj — rakontis poste Conan Doyle — ĉiuj 12 estis fore ekster Britio.

## ĈU VI KREDAS, KE ANKAŬ ARESTEJO PŬVAS ESTI PRIŜTELITA?

Kiel estas skribite en la gazeto „Soleil”, kiu estas eldonata en Dakar, ŝtelistoj eniris en arestejon, disrompis la malliberigejan kasejon kaj ekprenis la tutan monon. Ili rapide malaperis. Tio ne estus stranga, se ne temus pri iu malliberejo (kiu povus eksongĝi, ke ekzistas multe da mono tie) kaj, en ĉi tiu kazo, la estraro de la malliberejo en Thies situas tute apude de la malliberaja muro.

## TIBETANOJ KAJ TELEVIDO

En Tibeto je 380 enloĝantoj estas 1 televidilo, aŭ en la tuta Tibeto, kie loĝas preskaŭ du milionoj da loĝantoj, estas nur 5 miloj da televidiloj, mencias Hsinhua. Nur la ĉefurbo Laŝ kaj ankoraŭ kelkaj lokoj povas ricevi televidan programon, sed estas planite, tiun riceveblecon plilarĝigi. Rilate al la radio-programo, la situacio estas pli bona. Unu radioricevilo ekzistas je 10 Tibetanoj.

## EL LA LERNEJAJ BENKOJ

\*\*\*

Patro trarigardas la kajeron de sia filo kaj diras:

— Marko, via instruisto denove enskribis unuon en la kajeron. Eble vi ne komprenis lian demandon?

Marko iomete pripensas kaj diras al sia patro:

— Mi komprenis bone la demandon, sed la instruisto certe ne ekkomprenis mian respondon.

\*\*\*


Instruistino: Karlo, kie troviĝas subjekto en la sekvonta frazo: „La ŝtelisto estas kaptita”?

Karlo: En malliberejo.

\*\*\*

— Ekveku vian kolegon sidantan apud vi, krias profesoro al lernanto.

— Vi ekveku lin, sinjoro profesoro, ĉar vi ankaŭ dormigis lin, respondis la lernanto.



aŭtoro: D. Janci

Helpu al nia „Ovo”-vojaĝanto trovi la ĝustan vojon ĝis la Esperanto-stelo.



Supermarché Vacances, 10 rue de 4-Septembre, 75002 Paris, Francio, tel. 296 16 06, UC. 431 A organizas por vi:

Vojaĝcelo	Prezo de revenbileto (en francaj frankoj)
Tunis	1.390
Djerba	1.430
Marrakech	1.530
Agadir	1.550
Tenerife	1.730
Malaga	1.250
Palermo	1.400
Banjul	2.880

La ekflugoj estas de sur la pariza aŭ iu alia franca aerhaveno.

„OVO”  
INTERNACIA ĜAZETO POR DISTRO  
KAJ AMUZO  
Aperas 15 foje jare.

ELDONAS: Kroatia Esperanto-Ligo, Amruŝeva 5/1, 41000 Zagreb, Jugoslavio.  
KONSILANTARO: Ljerka Begič, Zlata Cundekovič, Đorđe (Gorĝe) Dragojlovič, Gordana Plavšić, Slavko Šimunič, Ivica Špoljarec, Spomenka Štimec.

REDAKCIO: Milena Grgič, Jozo Marevič, Nikola Rašić, Slavko Šimunič (ĉefa kaj respondeca redaktoro), Ivica Špoljarec (grafika kaj teknika aranĝo), Zlatko Tišljar, David, Rey.

ADRESO: „OVO”, Kroatia Esperanto-Ligo, Amruŝeva 5/1, 41000 Zagreb, Jugoslavio, tel. (041) 424-660.

PRESAS: Srednja ŝola tiska in papirja, Ljubljana, Jugoslavio.

PREZO de unu ekzemplero: 3 guldenoj (aŭ egalvaloro), por Jugoslavio 60.- din.

JARABONO: 35 guldenoj (aŭ egalvaloro), por Jugoslavio 700.- din.; validas por 15 numeroj ekde la momento de la enpago.

PAGU per poŝtpagilo al la adreso de la eldonanto aŭ al la perantoj.

## PERANTOJ

BELGIO: Eldonejo „Sonorilo”, Doornstraat 22, B-2610 Wilrijk.

BRAZILIO: „Fonte”, Caixa Postal 49, BR-89800 Chapeco, S.C.

BRITIO: Brita Esperanto-Asocio, 140 Holland Park Avenue, London W11 4UF

FRANCIO: Unuiĝo Franca por Esperanto, 4 bis, rue de la Cerisaie, F-75004 Paris

FR GERMANIO: Esperanto-Centro, Poŝtako 1450, D-4790 Paderborn  
KANADO kaj USONO: Zdravka Metz-Fleury, 6358 de Bordeaux, Montréal, Québ. H2G 2R8

NEDERLANDO: UEA, Nieuwe Binnenweg 176, NL-3015 BJ Rotterdam

SVEDIO: Eldona Societo Esperanto, Box 7502, S-200 42 Malmo

SVISLANDO: Jadranka Zadro-Mikuličić, Via Tabio 5, CH-6500 Bellinzona

## INTERNACIA HELPO

Ĉi nokte vi ne povis dormi? Viaj problemoj ŝajnas al vi nesolveblaj? Vi sentas vin tute sola kaj senpova en tiu ĉi vasta mondo? Ne estu pesimisto, levu la kapon! Almenaŭ OVO-redakcio pensas pri vi. Por helpi al vi ni enkondukis la rubrikon „Internacia Helpo”. Tio signifas ke ne nur la redakcio, sed ankaŭ nia legantaro kunhelpos ...

?

Mia 10-jaraĝa filino de sia dua vivmonato suferas je epilepsio. Ĉiutagaj atakoj difektis ankaŭ ŝian psikan evoluon. Fizike ŝi evoluas tute normale. Mi aŭdis ke en la mondo ekzistas medicinaj centroj kie oni povus helpi al ŝi per diversaj kuracmetodoj. Ĉu iu povus helpi per informo?

Dana P. (Jugoslavio)

!

Nia leganto Henning Droege el Tübingen (FR Germanio) sendis sian konsilon por infano kiu ofte suferas je angino. Li proponas ke la infano trinku salvian tizanon kaj ankaŭ gargaru per ĝi. Se al li malbongustas oni povas aldoni mieron. Rekomendinda estas ankaŭ infuzo de tusilago aŭ de lancetforma plantago.

## ga, ga...

ANSERAJ OVOJ

Finfine ankaŭ en mia vivo venis la granda momento kiam mi povus influ la historion! Mia grego taskigis min kun du aliaj samagaj anseroj prepari elekton de nova prezidanto de nia Esperanto-grupo. Mi tuj ekkomprenis la gravecon de nia tasko, kaj ekagis.

Mi proponis ke ni elektu samideanon Gakon — per bela voĉo kokete diris mia juna samklubanino.

Jes, li vere bone aspektas, kaj ĉiam portas sian verdan steleton sur refaldo de la jako. Kvankam li neniam invitis iun esperantiston gastigi ĉe li, ĉe la enirpordo de lia granda loĝejo ankaŭ estas unu verda flago.

Kaj ĉu li ankaŭ abonigis siajn gelnantojn al nia kara „OVO” — ĉesigis mi ŝian paroladon.

Ho ne, tio ne! Ĉar li dum la lastaj 40 jaroj ne gvidis eĉ unu kurson. Li fakte ne okupiĝas pri tiaj negravaĵoj. Li estas grandformata esperantisto. Li partoprenas kongresojn. Tiam li parolas pri niaj atingoj por la disvastigado de la movado. Li belege parolas pri diversaj instrumentoj, li recenzas Esperantlingvajn librojn, lernolibrojn, kaj eĉ verkas originalajn tragediojn en Esperanto...

Sed ĉu li abonis „OVO”-n? — insistis mi.

Mi kredas ke ne. Tio estas tro simpla afero por li. Kaj sufiĉe multekosta. Li preferas ĝin legi senpage en nia klubejo.

Tiam, forgesu lin kiel prezidanton — decide solvis mi tiun proponon.

Eble sinjoro Ĉako estus bona persono. — proponis naive mia dua kunlaborantino. — Li estas mezaĝa. Ne tro juna, ne tro ŝparema. Inteligenta, sufiĉe aktiva. Li interesigas pri multaj aferoj, estas tre lerta persono, tre estimata en nia tuta ĝardeno. Ĉiuj konas kaj eŝtimas lin.

Ĉu vi parolas pri tiu Ĉako kiu estas nia membro de ne pli ol 5 jaroj? Pri tiu persono kiu krom Esperanto eklernis kelkajn aliajn lingvojn, krom tio okupiĝas eĉ pri politiko? Ĉu vi ne aŭdis jam ke oni proponis lin por nia Parlamento?

Jes, lin — diris mia amikino.

Vi estas tro stulta eĉ por ansero. — eksplodis mi. — Ĉu vi ne scias ke tiaj personoj ne estas taŭgaj por niaj celoj. Neniu saĝa Esperanto-klubo elektus tian personon por sia prezidanto. Tiaj personoj povus fari nur malbonon al ni veraj esperantistoj. Imagu, kio okazus se li nur pro sia aŭtoritato sukcesus por

Esperanto varbi centojn da novuloj. Kun li povus al nia grego veni freŝaj ideoj kaj homoj kiuj dezirus esti pli aktivaj ol unu-foje semajne. Kaj kio tiam okazus al ni ... bonaj malnovaj membroj? Povus okazi ankaŭ ke tiu via altestimata sinjoro Ĉako pro oficialaj devoj ne estus libera por Zamenhofa festo. Kaj ĉu iam iu aŭdis pri belega Zamenhofa festo sen parolado de prezidanto?

Ho, jes, pri tio mi ne pensis — diris la junulino. Vi tute pravas. Kaj kion ni tiam faru?

Kion? Tion kion ni faris dum ĉiuj tiuj lastaj 40 jaroj — ni elektu nian karan samideanon Rakon. Li ne okupiĝas pri io ajn krom Esperanto. Li eĉ ne legas aliajn gazetojn krom Esperantlingvajn. Dum la lastaj 40 jaroj li ĉiam sambele dum Zamenhofa festo parolis pri lia vivo kaj glora verko. Li estas persono kiu de Zamenhof rekte lernis kiel oni laboru. Do, li jam dum jardekoj ne permesis ke en nia grego io ŝanĝiĝu, kaj li certe sukcesos tion fari ankaŭ estonte.

Jes, vi pravas — ekkriis miaj amikinoj kun feliĉlaroj en la okuloj.

Ni foriris al nia grego por raporti pri nia granda decido.

PUZLO

Jen ovo!  
 Detranĉu ĝin laŭ la linioj  
 kaj aranĝu la pecetojn por fi-  
 guri multajn birdojn.  
 Amuziĝu eltirante birdojn el  
 la ovo!

Giselle BAUDRY  
 Paris, Francio



KONKURSO!

SENDU AL NIA REDAKCIO ĈION  
 KIO ESTAS LIGITA KUN OVO KAJ  
 OVUMADO.


Ekzemple: ŝercojn, karikaturojn, fo-  
 tojn, poemajn, rakontetojn, rebusojn,  
 proverbojn, receptojn pri ovomangoj  
 ktp., aŭ ion pri la sciencaj esploroj pri  
 ovoj, pri ovo en diversaj lingvoj, pri la  
 rolo de ovoj en la homa historio, pri la  
 specoj de ovoj, do, pri ĉio ajn ligita  
 kun ovoj.

Vi povas sendi ion kion vi mem el-  
 pensis aŭ verkis, ion kion vi ie vidis,  
 tralegis, pruntis aŭ ŝtelis.

Sur la paĝoj de OVO ni aperigados  
 viajn kontribuojn kaj premiojn la  
 plej kvalitajn.

Jen nia adreso:  
 Kroatia Esperanto-Ligo  
 („OVO”-konkurso)  
 Amruŝeva 5/I  
 YU-41000 Zagreb

FOTO



„TRANKVILAN MARON!”

Foriro al nokta fiŝkaptado.  
 (Kreta Maro, Greklando)

Fotis: Ivica Špoljarec